

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

“La Orpantalono” en paralela traduko!

Nia grupo Esperanto Jokohama eldonis en la 1-a de junio infanlibron “La Orpantalono” en Esperanto kaj la japana. La originalo estas sveda infanrakonto de Max Lundgren en la sveda. Ĝin adaptis kaj tradukis esperanten Bertil Nilsson, kaj sveda esperanta eldonejo Al-fab-et-o eldonis ĝin en 1996. Ties japanigon faris nia rondano, s-ino Ohguro Yukiko, kaj aldonis glososn s-ino Doi Ĉieko. La libro estas 87-paĝa, kaj kostas 900 enojn.



TIEL OKAZIS

Hama-Ronda Vespero en majo

maj. 21, 17h00-19h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

temo: **Artefaritaj lingvoj --- diference de Esperanto**

12 personoj ĉeestis unikan prelegaron en Esperantujo.

(1) Nanba Fumiharu prezentis kelkajn novajn (de la fino de la 20a jarcento) artefaritajn lingvojn, kiuj havas difinitan celon anstataŭ esti vasta internacia helplingvo. Ekzemple “toki pona” estas minimum-isma lingvo kun nur cent kaj kelkdeko da vortoj, “lojban” (prononco: loĝban) estas por pravi logikecon esprimeblan.

(2) Sekvis Sibayama Zyun'iti, kiu klarigis pri “Solresol”, lingvo inventita en la fruaj jaroj de la 19a jarcento, kun homama intenco --- nome lingvo uzebla ne nur internacie sed inter blinduloj kaj surdmutuloj ---, sed ne povis akiri popularecon, ĉar estis tro malfacile memori vortojn konsistantajn nur el 7 alfabetoj, nome “do re mi fa sol la si”. (Vidu p.2, p.3.)

(3) Fine parolis gasto, kies plumnomo estas niftg, pri la logiko de lojban.

NIAJ PLANOJ

Hama-Ronda Vespero en junio

jun. 18, 17h00-19h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

temo 1: **La Germana Kongreso, skeĉo kun sufloroj kaj aliaj**

parolanto: s-ino Aihara Misako

temo 2: **La nove eldonita libro “La Orpantalono”**

parolanto: s-inoj Ohguro Yukiko kaj Doi Ĉieko

Niaj Klasoj kaj Kursoj

Okazas jenaj klasoj (ĝenerale en Kanagaŭa-Kenmin Sentaa)

*Regulaj Klasoj en sabato:

(1) Klaso Esenco por legi “Esenco kaj Estonteco de la ideo de Lingvo Internacia” / (2) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: “Vizaĝoj” / (3) Daŭriga kurso 2, lernado per “Hanako” / (4) Daŭriga kurso 1, tagoj nefiksitaj, lernado per “Hanako”

*Regulaj Klasoj en merkredo:

(1) Oni legas “La Zamenhof-Strato” de Roman Dobrzyński / (2) Daŭriga kurso: legata libro estas “Barbro kaj Eriko”.

Enhavo de la prelego pri Solresol

Hama-Ronda Vespero 2016-05-21
Sibayama Zyun'iti

La muzika lingvo

- el inter la projektoj de artefaritaj lingvoj -

sol re sol



el Vikipedio

Esperanto

日本の音階: ソレソ 1

La celoj de Solresol Filantropeco

--- ne nur internacieco (francoj kaj angloj ...)
--- sed por vidhandikapitoj
(en Eŭropo, 250 miloj da ...)
--- ankaŭ por aŭdhandikapitoj
(en Eŭropo, 210 miloj da ...)

sol re sol 2

Esperanto Jokohama


sol re sol

aŭdhandikapito
j

vidhandikapitoj

numere

stenografie



el Vikipedio

Esperanto Jokohama

3

Jean-François Sudre

1787- -1862

Inventita en 1827

Postmorte, la vidvino subtenadis



el Vikipedio

sol re sol

Esperanto Jokohama

ジャン・フランソワ・シュドル 4

Alfabeto – nur 7 elementoj
(do re mi fa sol la si)

Vorto estas koncepto, NE nuanco.

solresol = lingvo, idiomato, dialekto, filologo, lingvisto, ...
domisol = Dio, Jehovo, Zeŭso, Alaho, Jupitero, ...

sol re sol

Esperanto Jokohama

ドミノ = 天照大神? 5

Longigo kaj akcento – por gramatikaj varioj

*lasta vokalo longa: *sila*=knabo, *silaa*=knabino
*lasta konsonanto longa (duoblige):
doremire=okulo, *doremirre*=okuloj
*sen akcento=verbo: *resolmila*=daŭrigi
akcento en 1-a silabo: *RESolmila*=daŭrigo
akcento en 2-a silabo: *reSOLmila*=daŭra

sol re sol

Esperanto Jokohama

6

Vortotrezoro

1-silabaj: *do*=ne, *re*=kaj, *mi*=aŭ, *fa*=al,
sol=se, *la*=la (artikolo), *si*=jes

2-silabaj --- ofte uzataj vortoj, pronomoj:
dore=mi, *domi*=ci, *dommi*=vi
fala=bona, *fasi*=pli bona (komparativo)

sol re sol

Vortotrezoro

(343 vortoj!)

3-silabaj numeraloj:
redodo = 1, 1-a, *remimi* = 2, 2-a ...

3-silabaj vortoj por ĉiutaga uzo
(tempo, ago ktp.)

doremi=tago, *refala*=peti, peto

sol re sol

Vortotrezoro

4-silabaj vortoj, entute 2401.

do=homa; *doredore*=naskiĝi, naskiĝo
re=doma, familia: *remifala*=domo

5-silabaj vortoj, entute 16807.

pri la 3 regnoj de la naturo
dore=bestoj: *doredofare*=lupo

sol re sol

Vortotrezoro

inversigo de silaboj = inversigo senca
misol=bono, *solmi*=malbono
domisol=dio, *solmido*=satano, demono

Verbaj modoj
per aldono de modaj vortoj
domiremi =vidi, vidas
dodo domiremi=vidis

sol re sol

Ekzemplaj frazoj

dore domilado solresol
=mi parolas (lingvon) Solresol'n

redo faresimi do domilado solresol
=mia kato ne parolas Solresol'n

sol re sol

Solresol – hodiaŭa pritakso

Por ke lingvo estu interhoma,
hazardeco, vortoprovizo plej kulpas,
kvankam la idealo estas homama.

Proksima al la decimala klasigo
de libroj laŭ la priskribita enhavo ...
(4=scienco, 41=matematiko...)

sol re sol

Eseo

Cent jaroj da idiotaĵoj

DOI Ĉieko



En majo ĉi-jare mi kaj mia edzo vojaĝis al Kioto kaj Osako. Tiam ni vizitis la ekspozicion nomatan “Cent jaroj da idiotaĵoj”, kiu okazis en la Universitato de Arto kaj Desegno en Kioto, de la 29a de aprilo ĝis la 22a majo. Estis ekspoziciataj fotoj pri cent jaroj da idiotaĵoj sur nia planedo, kun simpla klarigo.

La ekspozicio okazis unue en Tokio en somero lastjare. Kaj ĉi-jare ĝi okazis en Kioto.

Kio estas “Cent jaroj da idiotaĵoj”? La ekspozicio celas alvoki ekagojn por ne ripeti tiajn idiotaĵojn.

Oni prezentis 10 grupojn da fotoj kun klarigo unuope: 1) Akvo: maro, rivero kaj lago, 2) aero, 3) arbaro kaj tero, 4) animaloj, 5) amasa produkto kaj amasa konsumo, 6) nukleo kaj teknologio, 7) militoj, 8) diskriminacioj kaj persekutoj, 9) rifuĝintoj, 10) malriĉeco.

Ekzemple, 1) la liberia petrol-ŝipo, kiu ellasis ĉ. 5000 tunojn da oleo en la golfo San Juan de Porto-Riko en 1968, 2) arbaro dezertiĝinta pro acida pluvo kaŭze de aera malpurigo en Ĉeĥoslovakio en 1991, 3) forbruligita arbaro por fekundigi la teron en Madagaskaro en 1993, 4) forlasitaj bestoj mortigotaj en Usono en 1998, 5) rubaĵoj en Britio en 1977, 6) atomcentralo en Ĉernovilo en 1990-1999 en Sovjetunio (poste en Ukrainio), 7) atombomboj super Hiroŝimo kaj Nagasako en Japanio en 1945, 8) apenaŭ-vivantoj en koncentrejo en Aŭstrio en 1945, 9) rifuĝintoj en Vjetnamio en 1968, 10) Surstrataj infanoj en Punonpeno, Kamboĝo en 1999.

La fotoj montras, kiel idiotaj kaj stultaj estis/estas homoj. Ni vivas ĉiam pli komforte kaj do ni pensas, ke homoj fariĝas pli kaj pli saĝaj kaj feliĉaj. Tamen rigardante la fotojn, mi pensas, ke ni devas ŝanĝi tian optimismon kaj ni devas rigardi la nunan socion realisme. Ni devas iel trovi ian elirejon por trovi solvon. Esperanto estas certe unu el tiaj solvo-metodoj, mi kredas.

Pri la temo “Cent jaroj da idiotaĵoj”, unue

oni eldonis libron en 2002 kaj la duan version en 2014. Por ke pli da homoj rimarku kaj interesiĝu oni havis ankaŭ ekspoziciojn. Intertempe okazis tragediaj aferoj: atenco en Usono en la 11a de septembro 2001, kaj Granda Tertremo en Nordorienta Parto de Japanio en la 11a de marto 2011. Tial la ekspozicio havas subtitolon “>911>311>”.

Jen estas la mesaĝo de la organizanto de la ekspozicio ĉi-jara:

“Ni mesaĝas al la ekspozicio <ekagi>. Estas necese aŭskulti diversajn opiniojn, kultivi sian penson, diskuti kaj agi por transiri danĝerojn de kvazaŭ-frenezaj perfortoj, medidetrooj, ekonomiaj diferencoj, minacoj kontraŭ demokratio ktp., kiuj ŝajnas ne finiĝi eĉ nun en la 21a jarcento. Per la ekspozicio ni volas pensi kun vi, kion fari por ne ripeti samajn idiotaĵojn fare de la homaro. La ekspozicio konsistas el fotoj prezentitaj en la du libroj (<Cent jaroj da idiotaĵoj> eldonita en 2002 kaj <cent jaroj da idiotaĵoj, la dua versio> eldonita en 2014) kaj afiŝoj pri la movado kontraŭ la konstruota finrubejo de nukleaj radioaktivaĵoj en Gorleben, Germanio.

La libro <Cent jaroj da idiotaĵoj> eldonita en 2002 konsistas el 100 fotoj kaj kontribuajtoj de kvin personoj (jam forpasinta Claude Lévi-Strauss kaj aliaj). Dum redaktado de la fotalbumolibroj okazis Atencoj en Usono en la 11a de septembro 2011, kaj dek jarojn poste okazis la granda tertremo en Nordorienta parto de Japanio kaj tuj poste eksplodis la Unua Atomcentralo de Fukuŝima, kies sekvo ankoraŭ ne finiĝis. Okaze de la akcidentoj ni denove alvokas <socian ekagon por ne ripeti idiotaĵojn>, kaj decidis eldoni la duan version de la libro kaj kolekti monon por tio. La libroj mesaĝas al ni <ekagi>”.

Ankaŭ ĉi tiu ekspozicio celas tion.

